


KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Sadretdinova Naila [Voronjeĵ, Rusio]

2004

Kiel William R. Harmon, honora membro de UEA iĝis esperantisto
verkoj de niaj legantoj — gramatiko serioze kaj amuze — neelpensitaj
historioj — ludoj por aktiva ripozo — aforismoj — anekdotoj — ripozejo
Pasporta Servo — korespondu!

4

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo. Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvořka 1. CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O.Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ermits, Villimaa 17 --- 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis. rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzcr, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Scgovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Brankovič

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vci 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugallio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckevagen 29, SE --- 24294 Horby

Svislando Christoph Schcidegger, Im Schleedorn 6, CH --- 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

La redakcio de "K" esperas, ke finiĝinta somero donacis al vi multe da belaj kaj interesaj momentoj kaj impresoj, kaj atendas viajn rakontojn pri tio.

La redakcianoj ankaŭ havis bonŝancon partopreni la 89-an Universalan Kongreson en Pekino, kie ni renkontiĝis kun multaj interesaj personoj kaj elstaraj esperantistoj, kiuj plezure konsentis rakonti por vi pri sia esperantistiĝo. Tiuj rakontoj atendas vin en proksimaj kajeroj de nia revuo, kaj la unuan el ili vi povas legi ĉe la najbara paĝo. William R. Harmon, eminenta esperantisto el Usono, honora membro de UEA rememoras siajn aventurojn, ligitajn kun lia esperantistiĝo. La rakonton kompletigas fragmentoj el liaj tradukverkoj.

En rubriko "Verkoj de niaj legantoj" ni kolektis kaj prezentas al vi ĉi-foje kelkajn senditajn al ni fabelojn. Du fabelojn verkis originale en Esperanto 9-jaraj(!) knabinoj el u. Ijevsk, Rusio. Malgraŭ tio, ke ili nur lernas Esperanton, la knabinoj ekkuraĝis verki en la internacia lingvo, kaj tiu fakto tre ĝojigas nin. Ĉi tie vi ankaŭ legos poeziajn verkojn de niaj konstantaj aŭtoroj kaj konatiĝos kun debuto de verkanto el Samarkando, Uzbekio.

Sur gramatikaj paĝoj S.Paĥomov daŭre prezentas siajn tradukojn pri lingvaj temoj.

Vin ankaŭ atendas freŝaj neelpensitaj historioj, ludoj por aktiva ripozo, tradiciaj aforismoj kaj anekdotoj. En nia ripozejo vi trovos interesajn enigmojn de Viktor Alikin.

Se vi ŝatas uzi servojn de "Pasporta Servo"- bonvolu rapidi por sukcesi en la liston de 2005!

Karaj amikoj! Komenciĝis abonperiodo por 2005! Ni esperas, ke ni amikos kaj kunlaboros kun vi ankaŭ en la sekva jaro!

Agrablan legadon!

KOMENCANTO

2004 numero 4 // (48) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavceva
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2004:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".
Sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Kiel tio komenciĝis

William R. Harmon

William R. Harmon (1927) honora membro de UEA; honora membro de ELNA (Esperanto-Ligo por Norda Ameriko); eksprezidanto, estrarestro kaj estrarano de ELNA; ekskomitatano de UEA, fondinto de kelkaj lokaj grupoj; sekretario kasisto de San Franciska Esperanta Regiona Organizo. Tradukisto de "Mia indiana knabeco", "Rakontoj de la Siuoj", kaj aŭtoro de "History of ELNA".


... unue ĝi aspektis kiel ia sekreta kodo

Mi naskiĝis en El Dorado, Kansas, en la centro de Usono, en 1927. Mia familio translokiĝis en 1937 al Los Angeles, Kalifornio. En 1939 mi estis studanto en Los Angeles, Kalifornio, kaj unu tagon mi vagis en la koridoroj de la lernejo tagmeze, serĉanta ion interesan (mi estis tia knabo!). Preterpasante malferman pordon, mi rimarkis dignaspektan instruiston sidantan ĉe sia skribtablo, manĝante supon el termosoj, kaj legante ion tre brikkoloran. Mi eniris, kaj la instruisto amikece salutis min. Mi demandis pri la brikkolora libro, kaj John Clewe informis min ke ĝi estas Esperanto-libro el Pollando. "Kio estas Esperanto?" mi demandis, kaj tie kaj tiam komenciĝis ĉio. Li klarigis pri la lingvo, montrante al mi kelkajn liniojn kaj interpretante ilin por mi. Li donis al mi kelkajn faldfoliojn pri Esperanto, kaj invitis min viziti lin iam ajn se mi volis havi helpon lerni ĝin.

Al mi unue ĝi aspektis kiel ia sekreta kodo. Mi estis 12-jara, scivolemega, kaj ĵus konatiĝis kun sciencfikcio. Mi tuj entuziasme ekstudis kaj skribis al eksterlandaj plumamikoj, kaj post kelkaj monatoj John Clewe invitis min ĉeesti kunvenon de la Esperanto Klubo de Los Angeles. Tio okazis ĉe Clifton's Cafeteria, manĝejo en la centro de Los Angeles, kaj mi loĝis en Huntington Park, eble 20 KM sude. Mia patrino ne estis tre feliĉa ke mi vojaĝu sola per tramo al Los Angeles, sed John Clewe persvadis ŝin permesi tion, kondiĉe ke iu esperantisto akompanu min dum la vojo ĝis la kunveno. Tiun rolon dum la sekvantaj monatoj ludis kelkaj membroj de EKLA, inkluzive Cecelia Peterson, Germaine Ĉomette, kaj John Clewe. Ili estiĝis miaj Esperantistaj geonkloj, ĉar mi estis la plej juna membro de la klubo - do la "talismanuleto".

Mia Esperantisteco formiĝis plejparte per tiu klubo, kies membroj en tiu tempo inkluzivis elstare bonajn kaj kapablajn eks-Europajn Esperantistojn kiajn Joseph Sĉerer, Ĉarles Ĉomette kaj edzino Germaine, Sander Bako. Mi tuj akiris "plejbonan amikon", iom pli aĝan ol mi, Forrest (Forrie) J. Ackerman, kies kromnomo estis "Fojak". Mi devis ankaŭ havi kromnomon, do oni elektis la nomon "Bohho." Forrie kaj aliaj plijunaj membroj estis sciencfikciaj manuloj, kaj aperigis okazan novaĵleteron pri sciencfikcio kaj Esperanto.

Jen mi, muknaza tute nova Esperantisto, kiu kuragiĝis (piibone aŭdacis) verki tradukon de tiam fama infanpoemo "Ferdinand the Bull". Mi faris multajn erarojn, kaj miaj geamikoj dum sekvantaj monatoj gaje montris ilin kaj korektis ilin al mi. (Neniam plu mi kuragiĝis traduki Anglalingvan poemon!)



Mi vizitis la hejmon de ges-roj Ĉomette en Los Angeles post mi estiĝis nova militmaristo en 1944, kaj tuj enamiĝis kun Dianto Ĉomette, belega filino de ges-roj Ĉomette. La gepatroj ne tre ŝatis tion, kaj la romano velkis. Tamen Dianto kaj ŝia fratino Lilio restas ĝis hodiaŭ miaj bonaj amikinoj. Ili estis la unuaj denaskaj Esperantistoj kiujn mi konis. En postaj jaroj mi renkontis multajn aliajn.

Dum mia knabeco, mia familio estis tre malriĉa. Mi ne havis multe da mono por Esperantaj libroj aŭ aktivecoj. Tamen miaj multaj amikoj en EKLA kompatis min kaj donacis multajn gazetojn kaj librojn al mi. Mi eluzis du vortarojn! Mi estiĝis militmaristo en 1944, kaj post trejnado en San Diego iris al kelkaj maristaj lernejoj kie mi akiris scipovon de elektronikaj aferoj. Ĉar mi studis stenografion en gimnazio (mi estis la sola viro en la klaso!), la militmaristaro ankaŭ donis al mi promocion al "Yeoman" (kontoroficiro), kaj mi servis sur diversaj ŝipoj en tiu fako, inkluzive novan aviadilportan ŝipegon USS Franklin D. Roosevelt. Je la fino de la Europa milito, tiu ŝipo vizitis diversajn lokojn en la Mediteranea maro, kaj tuj kiam mi eksciis kie la ŝipo enhaveniĝos, mi skribis al lokaj Esperantistoj por renkonti ilin sur la kajo.

Miaj samŝipanoj rimarkis, kiel Harmon ŝajne ĉiam havis amikojn lin atendantajn sur la kajo - kaj ofte belulinoj! - kaj ekinteresiĝis pri Esperanto, la kialo de tiuj renkontiĝoj. Rezulte mi starigis klasojn sur la ŝipo, kaj instruis Esperanton al kelkdek oficiroj kaj maristoj. Inter la plej memorindaj havenvizitoj estis Lisbono, kie atendis min sufiĉe granda grupo da lokaj Esperantistoj, inkluzive unu nomita da Silva. Tiu translokiĝis al Usono post multaj jaroj, kaj mi renkontis lin kelkfoje tie ĉi.

En 1972 mia edzino Lusi kaj mi translokiĝis al Tokio, Japanio, kie mi laboris kiel fakoĉefo por United States Lines, granda ŝiptransporta kompanio. De tuj post nia geedziĝo, Lusi estiĝis bona Esperantistino, kaj en Japanio nia socia vivo estis preskaŭ senescepte inter Esperantistoj. (Tro multe da "malbelaj Usonanoj" tiel!) Ni ĝuis multajn renkontiĝojn kaj festojn dum nia restado, dank'al Esperanto, kaj ni ankoraŭ havas dekojn da intimaj geamikoj tie. Ni kelkfoje vizitis la sidejon de Oomoto en Kameoka kaj la sanktan urbon Ayabe. Esperantistoj abundis ĉie. Kiam miaj kolegoj usonaj en la oficejo grumbliis pri la lingvaj problemoj - kaj estis multaj - mi interne ridis kaj pensis, "Nu... Mi ne havas tiajn problemojn!"

Speciale unu vesperon mi bone memoras en Japanio. Nia kutima "bando de 6" - Umeda Josimi, Kawakami Keniti, prof-o Koseki, prof-o Sakata kaj Lusi kaj mi - sidis sur balkono en montara vilaĝo. Estis varnege en Tokio, do ni fuĝis en la montojn por eskapi la varmon. La sakeo fluis, ni manĝetadis, kiam el la aero venis subita demando de iu, "post kiom da jaroj da Esperantista vivo oni rajtas nomiĝi veterano?" Iu alia respondis "mi opinias, kvardek". Josimi tiam demandis, "kaj kio oni estiĝas post 60 jaroj?" Mi respondis "mi opinias, doĵeno" kaj tuj sekvis demando "nu, do, kio oni estiĝas post 80 jaroj da Esperantista vivo?" Kaj Ken Kawakami senhezite respondis "bonŝanculo!"

Ĉijare mi estas vivinta en Esperantio 65 jarojn, do eble mi estas jam "doĵeno". Sed dank'al mia iom hazarda renkontiĝo kun Esperanto en lernejo en Los Angeles en 1939, kaj ties sekvoj, mi ja estas "bonŝanculo!"

William R. Harmon

W.R. Harmon afable donacis al la redakcio du siajn librojn. Tio estas tradukoj de indiĝentaj rakontoj, kiuj "sciigas al ni dum tro longa tempo preteratentitajn temojn de la malblankhaŭtula historio de Nordameriko", - kiel skribis en sia recenzo pri ili E.Grobe.

Estis ege interese por ni mem legi ilin kaj aperis natura deziro prezenti al vi, karaj legantoj, fragmentojn el tiuj tradukoj. Ĉi tie ni denove citas E.Grobe, kiu bone rimarkis, ke "legi tiujn tradukojn estas rekonfirmi nian opinion, ke Esperanto estas kompleta plenrajta, plenkapabla lingvo, nedevanta heziti antaŭ iu ajn inform-aŭ-raportotasko"

Ĉefo Luther Standing Bear

Tradukis el la angla
William R. Harmon

fragmento el la libro

Mia indiana knabeco La Siuoj



Miaj parencoj apartenis al tiu grandebenaĵa tribo nun nomata la Siuoj. Sed antaŭ la alveno de la blankhaŭtuloj, ni nomis nin la Lakotoj. La unuaj blankhaŭtuloj kiuj venis al ĉi tiu lando opiniis, ke ili trovis Hinduojn, landon de ili serĉatan, do ili nomis la homojn, kiujn ili trovis ĉi tie, Indianoj. Pro la eraro de tiuj unuaj blankhaŭtaj enmigrintoj, ni estas ekde tiam nomataj Indianoj.

... Poste, kiam multaj blankhaŭtuloj alvenis en ĉi tiun landon, ili rimarkis ke mia tribo etas tre potenca kaj sendependa. Ni retenis nian teritorion forpelante ĉiujn aliajn tribojn. Niaj batalistoj estis kuraĝaj kaj konataj pro siaj batalkapabloj. Tial ilin timis ĉiuj aliaj triboj. La blankhaŭtuloj, konstatantaj ke ni estas timataj de ĉiuj el la triboj kiuj ĉirkaŭis nin, mem ek-timis ankaŭ nin, do ili nomis nin Siuoj. La vorto "Sioux" estas Franca vorto kaj signifas "gorgotranculo". Do tiel oni eknomis nin Siuoj. Iuj verkistoj nomis nin la "Batalantaj Siuoj"; aliaj nomis nin la "Potencaj Siuoj". Ni Siuoj estis fieregaj, sed niaj virinoj estis mallaaŭtaj kaj ĝentilaj kaj niaj viroj estis kuraĝaj kaj dignaj. Ni gajnis la rajton al fiero, ĉar estis baza principo por Siuoj esti kuraĝa, kaj esti senkuraĝulo estis nepardoneble.

... La hejmo de mia tribo, la Okcidentaj Siuoj, estis ĉiom el tiu teritorio kiu nun nomiĝas Norda kaj Suda Dakoto, kaj ĉiom el tiu teritorio apartenis al mia popolo. Estis belega lando. En printempo kaj frua somero la ebenaĵoj, ĝis la limo de vidpovo estis kovritaj per velure verda herbajo. Eĉ la ondantaj montetoj estis verdaj, kaj ie tie estis bela rivereto. Tra la montetoj vagis la bizonoj kaj en la arbaroj kiuj apudis la riveretojn estis bongustegaj fruktoj kiuj estis niaj per la pluko. En la vintro ĉio estis kovrita per la neĝo, sed ni ĉiam havis abundon da manĝaĵo por daŭri tra la vintrono ĝis reaperis printempo. Vivo estis plena je feliĉeco kaj kontenteco por mia popolo. La Siuoj vivis longan tempon en ĉi tiu regiono. Neniu scias kiom longe. Sed ekzistas multaj legendoj pri mia tribo...

Tipio estis mia unua hejmo. En ĝi mi naskiĝis, kaj mia plej frua memoro estas de ludado ĉirkaŭ la fajro, prizorgata de mia Indiana patrino. Kiel bebo mi ŝvingis en mia Indiana lulilo de stangoj en la tipio. Mi estis la unua filo de ĉefo kaj mi estis celita maturiĝi kuraĝa kaj sentima kiel mia patro...

Dum mi maturiĝis, mia patro ekinstruis al mi ĉiujn aferojn, kiujn devas scii Indiana knabeto. Kiam mi estis sufiĉe aĝa por rajdi sur poneo, li instruis al mi kiel rajdi. Li ligis mian poneon al sia propra per ŝnuro kaj mi tiel rajdis ĝis mi lernis mem trakti la poneon. Kiam mi lernis rajdi, mi iris kun li en mallongaj ĉasadoj kaj li instruis al mi kiel buĉi malgrandajn ĉasbestojn. Fine, venis la grava tago kiam mi partoprenis bizonĉasadon. Tiu estis grava tago en mia vivo kiam mi hejmeniris al la tipio kaj informis mian patrimon, ke mi mortigis bizonon. Si tre fieris pri mi, kaj tio feliĉigis nin.

Mi lernis la kutimojn de sovaĝaj bestoj kaj kiel kapti ilin. Mi lernis kiel pafi birdojn per arko kaj sago kaj rosti ilin super fajro. Mi baldaŭ lernis multe pri la vetero kaj kiel prepariĝi por alveno de vintro per tanado de feloj por varma vestaĵo. Sciante ĉi tiujn aferojn, ni havis nenian timon de Naturo, sed male amis Naturon. Ŝi (la Indianoj kutime uzas "ŝi" por aludoj al "Patrino" Naturo.) abunde provizis nin per ĉiuj bezonaĵoj por nia komforto.

Je tiu tempo ni vivis proksime al Naturo kaj sciis nenion krom Naturon. Ni observis ĉion en la medio, kaj tiel lernis multajn faktojn kiuj servis nin bone. La Indiano scias, ke Naturo estas saĝa, kaj ke estante percepta, oni lernas ŝiajn saĝajn metodojn...

Ĉefo Luther Standing Bear

Tradukis el la angla
William R. Harmon

fragmento el la libro

Historietoj de la Siuoj Bizon-fratoj

Foje grandaj kampoj da oraj sunfloroj kreskis sur la ebenajoj de la Siua lando. Kaj la Siuoj kaj la bizonoj amis ĉi tiun belan floron. Ĝiaj folioj estis tiel brilaj kaj verdaj kaj la flavaj petaloj pli allogaj kaj delikataj ol oro.

Multaj flavaj birdetoj, tiom ke oni ne povus ilin kalkuli, ŝvebis super la kampoj da sunfloroj. Ankaŭ ili amis la sunflorojn kaj iliaj plumoj estis preskaŭ tiom flavaj kiom la petaloj tiel nete aranĝitaj ĉirkaŭ la brunaj centroj. La birdoj pikplukis ĉi tiujn brunajn semojn kaj multe konversaciis dume. Ne mirige, do, ke ni knaboj ŝatis ripozi kuŝe dum agrablaj tagoj en ĉi tiuj kampoj kaj spektis ĉiujn vidaĵojn kaj sonojn. Ĉio interesis nin.

La bizonoj ŝatis ruli siajn grandajn kapojn en la sunflorojn kaj multfoje ni vidis ilin kun longaj ŝuoj volvitaj ĉirkaŭ la maldekstra korno, ĉar ili neniam portis ilin ĉirkaŭ la dekstra korno. Eble ili fanis tion por ornamu sin, aŭ eble ili ŝatis la odoron de la floroj. Ni sciis nur, ke ili ŝatas la sunflorojn.

Kompreneble, ni knaboj ne provis tro alproksimiĝi al la bizonoj, sed ni sidis sur niaj poneoj ĉe distanco kaj spektis ilin. Dum la somero, se la muŝoj tre ĝenis, la bizonoj levis la polvon per la kornoj kaj la polvonubo kaŝis ilin de ni dum iom da tempo. Foje ni vidis ilin ludi kaj foje ni vidis ilin naĝi en lago kun nur la grandaj nigraj kapoj super la akvo. De distanco, aspektis kiel unu moviĝanta nigra korpego sur la akvosurfaco.

Unu tagon okazis granda ĉasado. La Bravuloj mortigis multajn bizonojn kaj portis hejmen multajn peltojn.

La sekvan tagon kelkaj el ni knaboj rajdis en la ebenajon. Ne videblis bizonoj. Ĉio estis silenta escepte

de la birdetoj en la sunflorkampoj. Mi rajdis sola supren laŭ monteto kaj, rigardante ĉirkaŭe, vidis du bizonojn. Mi estis mirigita, ĉar mi opiniis ke oni mortigis aŭ fortimigis ĉiujn. Mi sidis sur mia poneo kaj rigardadis. Unu bizono estis sur la tero kun siaj piedoj sube; la alia nazumis kaj puŝetis la alian per la kapo kaj kornoj. Scivolema, mi rigardis plu kelkajn momentojn antaŭ ol mi konstatis ke la bizono sur la tero estis aŭ malsana aŭ vundita. La antaŭan tagon, sendube, li estis vundita, sed povis eskapi la ĉasistojn. Ĉe ĉi tiu loko li kuŝiĝis, malforta pro perdo de sango. Pro la gruntaj urĝoj de la helpema bizono, la vundito provadis leviĝi. Ĉiun fojon kiam li provis, li rektiĝis la antaŭajn kruojn, sed ĉiun fojon refalis teren. Tamen ĉi tio ŝajne sufiĉis, ĉar la amikeca bizono foriris.

La sekvan tagon mia scivolemo reportis min al tiu loko, sed mi venis sola. La vundita bizono ankoraŭ sidis sur la tero. Post kiam mi atendis unu-du horojn, mi vidis la alian bizonon veni. Kiam li atingis la vunditon, okazis saluto per kornoj kaj kapo. La sana bizono kuraĝigis la malsanulon per frotado kaj puŝetado kaj puŝis lin per la kapo. La kompatindulo stariĝis kaj staris momente, sed falis refoje al la tero. La duan fojon kiam li stariĝis li piediris kelkajn paŝojn kaj refoje kuŝiĝis. Sed li estis en pura loko kaj proksime estis iom da verda herbaro. Iom poste la vizitanta bizono reiris al sia grego, ie en la distanco kaj ekster la vido.

Nun mi ne povis deteni min reiri por konstati, kio okazos, do la sekvan tagon mi refoje rigardadis. La fidela amiko refoje venis kiel antaŭe kaj la vundita bizono ŝajne sufiĉe resaniĝis, ĉar post iom da kaĵolado li stariĝis sur malfortaj kruoj kaj sekvis sian amikon for per malrapida sed daŭra paŝado.

Mi vidis ilin malaperi kaj mi iris hejmen sentante ke mi estis plibonigita per ĉi tiu leciono pri bonkoreco.



ilustraĵoj de **Herbert Morton Stoops** el la libroj

Jelena Jakovleva [Arĥangelsk, Rusio]

Kaĉo el hakilo *Rusa popola fabelo*

En malnova tempo soldato, fininta sian soldatan servadon revenis hejmen. Longa estis la vojo. Iris li, iris, ekvolis manĝi, sed lia soldata dorsosako estis malplena. Vidis soldato – staras riĉa domo. Kaj onidire mastrino de tiu domo estis tre avara, ĉion ŝi kaŝis kaj nenion al iu donis. La soldato decidis eniri kaj peti manĝaĵon.

- Kara mastrino, bonvolu doni al mi manĝi, mi estas malsata, iras mi el malproksimo.

- Mi nenion havas, mem manĝas nur panon kaj akvon, - diras ŝi.

“La mastrino ne volas manĝigi min, sed mi faros tiel, ke ŝi tamen nutros min!” – pensas la soldato.

Rigardas la soldato - ĉe la pordo staras hakilo.

- Kial vi diras, ke havas nenion?. Jen staras hakilo, el ĝi mi povas kuiri kaĉon. Mi manĝos kaj vi manĝos.

- Soldato, vi frenezigiĝis. Kia kaĉo eblas el hakilo?

- Hejtu foron, verŝu akvon en kaserolon, metu en ĝin la hakilon. Poste vi vidos, - diris la soldato.

La mastrino faris, kiel la soldato ordonis. Akvo ekbolis, la soldato prenis kuleron, gustumis.

- Bona estas la buljono. Sed necesas iomete saligi ĝin.

La mastrino ankaŭ ekvolis gustumi la kuirajaĵon, sed la soldato ne permesis.

- Oni devas nur saligi. Donu al mi salujon. La mastrino donis salujon al la soldato, li salis kuirajaĵon kaj ree gustumis.

- Ĉio bonordas, jam tempas aldoni grion.

- Bone, mi ĝin alportos, - diris la mastrino, iris en la proivizejon kaj alportis saketon kun grion. La soldato ŝutis grion en la kaserolon, denove gustumis.

- Tiam bongustaĵon mi neniam gustumis! Se aldoni nemulte da butero, estos eĉ pli bonguste.

- Prenu, jen al vi butero. Kiam eblas manĝi vian kaĉon?

- Atendu iomete, kara mastrino. La kaĉo dume kuiriga. Preparu pli bone manĝotablon.

Kaj jen sidas ili ambaŭ ĉe la tablo. Kuleron de kaĉo manĝas mastrino, kuleron de kaĉo manĝas nia soldato. La kaĉo finiĝis. En la kaserolo restis nur la hakilo.

La mastrino demandas:

- Kiam ni manĝos la hakilon?

- Hakilon... Ĝi ankoraŭ ne finkuiriga. Morgaŭ denove ni kaĉon kuirus – tiam ĝi estos preta, – respondis la soldato.

Dankis li la mastrinon kaj foriris plu laŭ sia vojo. Longe pensis la mastrino, kial la soldato ŝin dankis – ŝi ja nenion al li donis! Ŝi ne povis kompreni, kiel la soldato ruzeco venkis ŝian avarecon.

Ambaŭ aŭtoroj estas 9-jaraj knabinoj, kiuj diligente lernas Esperanton. Bronislav Ĉupin, la instruisto.

Anja Jevstafjeva [Ijevsk, Rusio]

Originala fabeleto

La knabino kaj la katinino

Vivis-vivadis eta knabino. Ŝi havis amatan katinon Ljusjka. La knabino vizitadis infanĝardenon kaj Ljusjka-n ŝi lasis hejme. Iun tagon la knabino metis sur la divanon sian ŝatatan pupon kaj foriris en la infanĝardenon. Kaj la katinino satmanĝis kaj ekdormis. Kiam Ljusjka vekigiĝis, ŝi estis enua kaj ŝi komencis ludi kun la pupo.

Kiam la knabino revenis el la infanĝardeno, ŝi ekvidis, ke la pupo forestas. Ŝi longe serĉis ĝin kaj trovis malantaŭ divano. La knabino severe ekrigardis Ljusjka-n, kaj tiu, kompreninte sian kulpon, subpremis la voston.

Saŝa Stjaĵkina [Ijevsk, Rusio]


Originala fabeleto

Geamikoj

Vivis-vivadis sciuro kaj katidoj. Ili vivis amike. Iun tagon ĉe la katidoj mankis lakto por trinki. La sciuro decidis helpi al la amikoj. Kaj ĝi iris al magazeno. Laŭvoje al la magazeno ĝi estis devigita transiri la ŝoseon. La sciuro ĝisatendis, kiam eklumos verda lumo, kaj transiris la ŝoseon. En la vendejo ĝi aĉetis lakton kaj ekiris reen.

Kaj jen la sciuro ekvidis, kiel malgrandaj leporetoj intencis transkuri la ŝoseon antaŭ veturantaĵoj. Unu el ili jam estis sur la ŝoseo. Kaj jen eksonis fajfo de leonopolicisto. Kaj la leporeto ekkuris reen. La leono severe edifis la leporeton. Li klarigis al la leporetoj, ke oni rajtas transiri ŝoseon nur tiam, kiam estas lumigita “verda hometo”.

La sciuro trankviliĝis kaj ekhastis al la katidoj. Ĝi trinkigis ilin per lakto kaj rakontis al ili pri la okazintaĵo. Tiel ili eksciis de la pli aĝa amikino pri reguloj de transiro de ŝoseoj.



Perevalov Jurij, [Lesnoj, Rusio]

Vladimir Ŝĉotkin [Samarkando, Uzbekio]

Ili saltas-konkursas

Saltas jen etuloj vigle sur vojetoj,
Dense okupitaj asfaltaj kvadratetoj.

Iu ne sukcesis fari la salteton -
Tial ekaŭdiĝis ploro kortuŝeta.

Saltas kaj konkursas ili sin gajnante -
Ili tre rapide volas kreski alte.

La infanoj laŭte frapas per kuleroj,
Apetite manĝas ili eĉ panerojn.


Manĝas ili supon kaj trinkas kompoton,
Supo en telero kaj desert' - en poto.

Post kompoto dolĉa kaj de fruktoj plena
La silento regas en dormad' solena.

La infanoj estas admirinde sorĉaj,
La infanaj songoj estu vere dolĉaj!

Eksilentu bruoj kaj ekhaltu ŝtormo!
Restu tre trankvila por l'infanoj dormo!

Tsss!



Všivceva Galina [Miass, Rusio]

Cezar [Altenburg, Germanio]

Abelaj instruoj

Se Abel' nin krude pikas,
tio ja ne nur tragikas.
La abelo nin indikas,
ke plu vivo en ni ŝrikas.

Kaj mortante la abelo
montras ja kun vera belo,
ke sindon' por granda celo
estas pli ol nur fabelo.

Aleksandr Morjev [Puŝkin, Rusio]

Aŭtuno en urbo Puŝkin

Malseka foliar' sur stratoj.
Hodiaŭ pluvas en urbeto.
Malproksimiĝas trajn-radbatoj
Kaj iĝas en anim' kvieto.

Ho, kia bona tago nuna!
Ĉielon respegulas flakoj.
Mi vagas tra l' urbet' maljuna
Sub oraj arbaj branĉoj-brakoj.

Ĉi tie Puŝkin iam paŝis
Kun sia amikar' bruema.
Kaj la etoso eĉ ne kraŝis
De nia tempo - ege prema!

Vladimir Plungian,
elrusigis Sergej Paĥomov [Kirov, Rusio]

Ankoraŭ pri transformoj en lingvo: la transformoj en gramatiko

Ni eksciis pri lasta speco de lingvaj ŝanĝoj. Ni jam parolis pri la ŝanĝoj, kiuj koncernas nur vortojn mem. Sed estas ŝanĝoj, kiuj koncernas lingvon mem aŭ, kiel diras la lingvistoj, la ordon de lingvo, alivorte - gramatikon.

Al gramatiko rilatas ĉio, kio koncernas kunligojn de vortoj en lingvo. Ĉu estas en lingvo kazoj? Kiom da ili estas? Kiel ili uzatas? Kiuj tempojn en lingvo havas verboj? Ĉu estas prepozicioj? Ĉio ĉi kaj multo alia konsistigas gramatikon.

Vi komprenas, ke ne sciante gramatikon ne eblas korekte paroli en lingvo, nek bone kompreni tion, kion vi aŭdas. Gramatiko estas la fundamento de lingvo, ĝia "skeletono". Sed ankaŭ gramatiko ŝanĝiĝas dum tempo. Ekzemple en antikva rusa lingvo ekzistis kazoj, ili ekzistas ankaŭ en la moderna rusa, sed multaj vort-finaĵoj kaj kazoj estis antaŭe aliaj.

Pluralo, singularo kaj ...

Ankoraŭ unu ekzemplo. Al la demando: kiom da gramatikaj nombroj havas substantivo en la rusa? - ĉiu lernanto respondus: du. Ili estas singularo kaj pluralo. Ĉu povas esti alie? Jes, en la antikva rusa la substantivo havis trian nombron, nomitan *pareca*. Ĝi estis uzata kiam temis nur pri du objektoj - du okuloj, du manoj ktp. Ekzemple, unu najbaro nomiĝis en la antikva rusa *sused'*, multo da najbaroj estis *susedi*, sed pri du oni diris *suseda*. Lingvisto kvazaŭ arkeologo atente esplorante modernan lingvon, povas diri multon pri ĝia pasinteco.

Ĉu povas malaperi kazoj?

En gramatiko povas okazi ankaŭ pli seriozaj ŝanĝoj. Ĉu povas malaperi kazoj? Jes, tiel okazas. Substantivoj en lingvo ne plu uzatas en deklinaĵoj kaj en ĉiu ajn loko de frazo komencas aperi en unu sola formo. Ĉi tio signifas ke kazoj forestas en la lingvo, kiel ekzemple en la angla, franca. Interalie, en la lingvoj angla kaj franca kazoj ekzistis, pli ĝuste en la malnov-franca kaj en

la antikva angla. Vere, en la malnov-franca ili estis nur du, sed en latino, la lingvo-antaŭulo de la franca, ili estis kvin, eĉ en malfrua epoko. Se en lingvo restis du kazoj el kvin, do la du vivos ne longe. Tamen dum ducent aŭ tricent jaroj en Francio oni parolis en tia lingvo.

Ankaŭ malaperis kazoj en bulgara lingvo. Bulgara kaj rusa lingvoj havas la saman praavon: la praslavan. Sed la kazoj en la praslava (ankaŭ en la antikva bulgara) ekzistis ne malpli ol en la rusa. Komparu vi mem: ekzemple "tablo" bulgare estas *masa*, "sur tavolo" kaj "sur tablon" estas *na masa*, "sub tavolo" kaj "sub tablon" estas *pod masa* ktp. La vorto uzatas nur en unu formo same kiel en la moderna angla aŭ franca.

La ŝanĝoj en gramatiko plej multe malproksimigas unu lingvostaton de alia lingvostato. Se vortoj sonas iom alie kaj kelkaj vortoj havas alian senco, ĉi kaze la diferenco ne tiom rimarkeblas. Kontraŭe, se en lingvo ŝanĝiĝas deklinaĵo, do la lingvo ŝanĝiĝas tiom ke ni diras: jes, la antikva lingvo kaj ĝia nova heredanto estas efektive du diversaj lingvoj...

Nun vi havas ĝeneralan imagon pri ŝanĝoj kaj transformoj en lingvoj. Unue: konstante ŝanĝiĝas sencoj de vortoj, unuj vortoj malaperas - la aliaj alvenas, ofte el lingvoj de aliaj popoloj. Due: ŝanĝiĝas prononcado, povas malaperi unuj sonoj, sed aperi la novaj. Fine ŝanĝiĝas diversmaniere gramatiko de lingvo, ĝia fundamento mem.



Bill Thorne, [Londono, Britio]

LINGVAJ RESPONDOJ L. L. Zamenhof

Pri la esprimoj
“Jam ne...” kaj “Ne... plu”

Por tre multaj okazoj ambaŭ esprimoj ŝajnas al mi bonaj, kaj mi tute ne vidas ian kaŭzon, kiu devigus nin diri: uzu *nur* la unuan aŭ *nur* la duan esprimon. Kial senbezone forpreni de ni la liberecon en tiuj okazoj, kiam ĝi prezentas nenian maloportunaĵon? Tamen *ne ĉiam* ambaŭ esprimoj povas reciproke anstataŭi unu la alian. Ekzemple anstataŭ “ne parolu plu” ni ne povas diri “jam ne parolu”.

Doni tute precizan klarigon de tiaj nedifineblaj vortoj, kiel “jam” aŭ “plu” estas tre malfacile, kaj oni facile povus erari; tial mi limigas min nur per tio, ke mi donos klarigon *proksimuman*, ne garantiante, ke mia klarigo taŭgos por *ĉiuj* okazoj. “Jam” laŭ mia opinio efektive enhavas en si la ideon de ŝanĝo de stato, kiel montris “The British Esperantist”; “plu” enhavas la ideon de daŭrado. “Jam ne” povas rilati ankaŭ al io, kio antaŭe ne ekzistis, sed estis nur intencata aŭ esperata, — “ne plu” rilatas al io, kio ekzistis jam antaŭe. Ekzemple, se mi eĉ neniam vizitis vin, sed nur intencis tion fari, mi povas diri “mi jam ne vizitos vin” (se mi ŝanĝis mian intencon), sed “mi vin ne vizitos plu” mi povas diri nur en tia okazo, se mi jam antaŭe vizitadis vin. La esprimon “ne jam” (kiu signifas ion tute alian ol “jam ne”) mi tute ne konsilas uzi, ĉar ĝi povus kaŭzi malkompreniĝon; anstataŭ ĝi mi konsilas uzi “ankoraŭ ne”.

Diri “pli” anstataŭ “plu” oni povas tre ofte, sed ne *ĉiam*.

“Pli” = pli multe, “plu” = daŭre, pli malproksimen; “pli” signifas kvanton, multecon, — “plu” signifas daŭradon (en loko aŭ tempo); en abstraktaj okazoj ni ofte povas uzi unu esprimon anstataŭ la dua, ĉar tiam ilia senco fariĝas preskaŭ la sama; sed kiam ni volas paroli rekte pri kvanto aŭ pri daŭrado (aŭ malproksimiĝado), tiam ni ne povas intermiksi la ambaŭ vortojn.

Respondo 26, *La Revuo*,
1907, Oktobro


Pri “multe da” kaj “multa”

La formoj “multe da laboro” kaj “multa laboro” estas egale bonaj. Egale bonaj ankaŭ estas la esprimoj “mi konas tiom homojn” kaj “mi konas tiom da homoj”, sed ne bone estus diri “mi konas tiom da homojn”, ĉar en la lasta esprimo la formo “homoj” dependas ne de la vorto “konas”, sed de la prepozicio “da”, kiu ne postulas la akuzativon.

La esperantisto, 1890, p.60

Estas diferenco inter “multaj homoj” kaj “multe da homoj”: “multaj homoj” = diversaj homoj (ĉiu aparte); “multe da homoj” = granda nombro da homoj (kune).

Esperantisto, 1893, p. 96




Pri la vorto “Ĉu”

Vian opinion, ke la vorton “ĉu” ni devas, kiom eble, uzadi nur en senco demanda, mi trovas tute prava. Ni povas ĝin uzi ankaŭ en la senco de necerteco, aŭ de dubo, aŭ en aliaj similaj sencoj, kiam ni ne havas pli bonan vorton (kiel en via ekzemplo “ĉu pro timo, ĉu pro fiereco, li nenion respondis”), sed mi neniam konsilus uzi ĝin tute senbezone anstataŭ “jen”, “aŭ” k. t. p. Prave vi diras, ke la frazoj “ŝi kutimas havi ĉe sia zono ĉu rozon, ĉu diamanton” kaj “diru tion ĉu al la kapitano, ĉu al la leŭtenanto” estas ne tre bonaj; en la unua okazo mi preferus “jen”, en la dua “aŭ”

respondo 21, *La Revuo*, 1907, Junio

Neelpensitaj historioj

Rakontis **Andrej Korobejnikov**,
talenta juna pianisto kaj
esperantisto, dum Rusiaj E-Tagoj
en Tihvin, aŭg. 2004



Mi estis 10-jara knabo. Ni kun mia patrino tiam loĝis apud Moskvo. Kaj mi lernis en Moskva konservatorio kaj devis ĉiutage veturi tien-reen per apudurba elektrotrajno.

Oni scias, ke en publika trafiko en multaj landoj homoj kantas, ludas muzikilojn, montras magiaĵojn kaj diverse distras pasaĝerojn kaj perlaboras monon. Ankaŭ en Rusio aperis tiaaspecaj menestreloj precipe en elektrotrajnoj.

Krom tio, ke mi jam sufiĉe profesie tiam ludis pianon, evidentiĝis, ke mi havas belan voĉon. Kaj jen foje ankaŭ mi kuraĝiĝis kaj ekprovis kanti en vagono. Mi paŝis inter la seĝoj laŭ la vagono kaj laŭte kaj kortuŝe kantis rusajn popolajn kantojn. La publiko ege varme renkontis tiom junan kantiston kaj volonte ĵetadis monerojn en mian "ĉapelon". Fine de vagono mi riverencis kvazaŭ en koncerto kaj publiko aplaudis.

Neniu sciis pri tiu mia "kromlaboro", des pli ke laŭ tiamaĵ moroj oni opiniis, ke estas honte por konservatoria studento kanti en publika trafiko.

Ordinare mi sukcesadis trairi la tutan vagonaron ĝis mia haltejo, entute dek vagonojn, kaj tre bone perlabori. Ni tiam vivis kun mia patrino tre nerice, mi ne povis peti de ŝi monon por kutimaj infanaj plezuroj, sed tiamaniere mian "poŝmonon" mi perlaboris mem kaj eĉ fieris pro tio. Tamen tio estis sekreto, nek la patrino, nek la instruistoj sciis pri mia trajna kantado.

Kaj jen foje mi kutime kantas, iras tra la vagonaro, venas jam en la lastan vagonon, "ĉapelumas" monerojn, danke riverencas al ĉiuj kaj subite aŭdas: "Andrej! Kion vi faras?". Mi turnas la okulojn kaj... renkontas mian konservatorian instruiston! Ah!!! Diable! Mi kaptiĝis! Mi honte ruĝiĝis, nenion respondis kaj fulme forsaltis el la vagono. Ekde tiam mi ne plu kantis en vagonaroj.

Aleksej Golovanov [Kurgan, Rusio]

Neordinara pensmaniero

Mia amiko antaŭnelonge revenis el la armeo kaj rakontis veran okazintaĵon, kiun li partoprenis.

En lia roto servis armeon plejparte fortikaj kamparanaj junuloj kaj inter ili iel okazis unu magra okulvitra eks-studento de universitato. Kiel li trafis la armeon?

Foje en la regimenton venis generalo por inspektista kontrolo. La soldatoj viciĝis sur la placo kaj atendis aperon de la generalo. Jen li aperis akompanata de la oficiroj kaj ekpaŝis al la soldatoj laŭ la asfalta pavimo.

Subite la generalo ekstaris, surgenuiĝis kaj kliniĝis al la tero per sia orelo. Post kelkaj sekundoj li laute diris: "Zumas". Ĉiuj oficiroj ankaŭ surgenuiĝis kaj orelumis la asfalon. Kaj ĉiuj ili unuvoĉe konfirmis: "Jes, sinjoro generalo, zumas". Sed por la generalo ial ne sufiĉis opinioj de la oficiroj kaj li ordonis al la soldatoj same kliniĝi al la tero kaj aŭskulti asfalon. Kaj ĉiuj soldatoj same diris: "Jes, sinjoro generalo, zumas". La plej lasta alasfaltiĝis nia eks-studento, kiu streĉe aŭskultis dum kelkaj sekundoj kaj poste diris, ke neniu zumo aŭdeblas.

La oficiroj ege konsterniĝis pro tiaaspeca aroganteco flanke de soldato, sed diri nenion sukcesis. La vorton prenis nia generalo. Li proksimiĝis al la soldato, patre frapetis lian ŝultron kaj laŭte, por la tuta placo ordonis: "Du semajnojn da ferioj al vi pro neordinara pensmaniero!"

pentris sur la paĝo Kornjuĥina Anna [Barnaul, Rusio]



Esperantigis **Viktor Derjavin**
[Aŝa, Rusio]

Ŝerca terminaro

Alteco
daŭrigo de profundeco.

Cerbo
estas organo per kiu ni pensas, ke ni per ĝi pensas.

Ĉefo
ĉe li ĉiuj fingroj estas montrifingroj.

Feliĉo
ne havas pluralon.

Historio
estas scienco pri tio, kia devas esti pasinteco.

Hodiaŭ
estas morgaŭa hieraŭ.

Intelektulo
ulo tro saĝa, por kompreni simplajn aferojn.

Komitato
grupo da uloj, kiu decidas, ke fari eblas nenion.

Malbono
estas bono, veninta al la potenco.

Malnova
estas bone forgesita la nova.

Minuso
estas duono de pluso.

Pesimisto
bone informita optimisto.

Reto
estas truoj, ligitaj per ŝnuretoj.

Ludoj por aktiva ripozo

Interesa ludo

Preparo: Streku sur la tero cirklon kun du-metra diametro. Ludu du personoj ĉiu kun unu aŭ du ciferoj skribitaj sur kartono sur la dorso. Krucinte siajn manojn postdorse, la ludantoj staru vid-al-vide en la cirklo.

Metodo: Dum la ludo ĉiu el la ludantoj en la cirklo devas klopodi ĉiamaniere por vidi la cifero (j)n sur la dorso de la kontraŭulo kaj laŭeble ne vidigi la sia(j)n. Kiu la unua vidas la cifrero(j)n sur la dorso de la kontraŭulo, gajnas la ludon.

Remarkoj:

1. La ludantoj devas streĉi siajn manojn ĉe la dorso.
2. Neniu el la ludantoj rajtas korpe puŝi la kontraŭulon.
3. Eraras tiu, kiu piedpremas aŭ transpasas la cirklon. Kiu trifoje faras tion, malgajnas la ludon.



Danco sur gazeto

Ludas du partneroj. Rivalas kelkaj paroj de dancantoj.

Oni metas sur plankon malfalditajn gazetojn. Du partneroj, li kaj ŝi akompane de muziko komencas danci sur la gazeto tiel, ke oni ne forpaŝu preter la gazeto. Post kelkaj minutoj la gvidanto duonigas la areon de la gazetoj, faldante ilin. La paroj daŭrigas danci. Poste la gvidanto denove duonigas la areon por danci, faldante la gazetojn duone. La paroj denove ekdancas. Kaj tiel plu. Se iu partnero el iu el paroj tamen preterpaŝos preter la gazeto, tiu paro malgajnas kaj foriras.

La ludon gajnas tiu paro, kiu sukcesos surdanci malpligrandan gazeton ne preterpaŝante ekster la gazeto sur plankon. La ludo estas vere gaja plejparte por la spektantoj.

Monero estas for eta magiaĵo

Oni povas distri la kompanion per etaj magiaĵoj kaj lertaĵoj, kio ĉiam plaĉas al la ĉeestantoj.

Prezentado: Ludanto tenas moneron en la dekstra mano, montras ĝin al spektantoj, pugnigas la manon kaj denove etendas la fingrojn. Jen oni trovas, ke la monero jam malaperas.

Metodo: Volvi travideblan glupaperon ĉirkaŭ la pinton de la meza fingro (talki la paperon ĉe la hauto de la supra parto de la fingro kaj tiel forigi ĝian gluecon por garantiu sukceson de prezentado). Kiam la ludanto pugnigas la manon, li algluas la moneron al la papero ĉe la mezfingra ungo. Kaj kiam li disvolvas la manplaton, la monero estas ĉe la dorsa flanko de la fingro kaj la spektantoj ne povas ĝin vidi.

AF 😊 RISM 😞 J



Julio Baghy

Karaj legantoj!

Ĉi-foje en la rubriko ni prezentas al vi poetikajn aforismojn de la klasikulo de Esperanto-literaturo Julio Baghy, kiujn li mem nomis "Sableroj".

Sableroj

Se vi volas havi fidindan spegulon,
al interno propra vi turnu l' okulon!

*

Ne la nomo faras faman homon,
sed la homo faras faman nomon.

*

La poezio instruas nin senti;
vivo reala la sentojn pripenti.

*

La prozo de l' vivo vekas doloron,
sed proza vivado rompas la koron.

*

Homo, velanta super abismo, rifo,
nepre konscias pri sia sensignifo.

*

Tiun ne afliktas ŝarĝo de malscio,
kiu ne konscias pri valor' de scio.

*

Kredi – nur infano kutimas;
viro agas, neniun ektimas.

*

Ĉiun idealon beligas la mensogo;
prenu for la veston –
ĝi restas sen allogo.

*

Se ekparolas ama sento,
ofte eraras la prudento.

*

Ĉiun viran forton-jam estas destino –
venkas per malforto-plej simpla virino

*

Kiu asertas: komprenas mi ĉion,
tiu tutcerte komprenas – nenion.

*

Ĉiu malriĉulo je mono sopiras,
ofte la riĉulo feliĉon aspiras.

Elektis kaj esperantigis
Igorj Zvjagin [Kurgan, Rusio]

Estas ni averaĝaj
inter
stultaj kaj saĝaj

Ekzistas nur du senlimaj substancoj – la
universo kaj stulteco.

Albert Ejnŝtejn

*

Plej bonaj pensoj venas al ni dank'al
stultaĵoj.

Karel Ĉapek

*

La plej rapida maniero ricevi atenton de
aliuloj estas diri aŭ fari stultaĵon.

NN

*

La telegrafa fosto neniam komprenos
funkciadon de telegrafo.

Leh Sobeski

*

La saĝuloj pli lernas de stultuloj, ol
stultuloj de saĝuloj.

Katon la aĝa

*

Ajna stultulo scias, ke la ĉielaj steloj ne
estas atingeblaj, sed la saĝuloj, malgraŭ
tio, konstante faras provojn ilin atingi.

Garr. Anderson


*

“Mi ordonas al la sinjoroj
parlamentanoj parolojn fari ne laŭ
preparitaj tekstoj, sed per propraj
vortoj, por stulteco de ĉiu estu tuj
videbla.”

Perto la 1-a, Rusia imperiestro



Hismatulin Albert [Troick, Rusio]



Selektis kaj esperantigis

Adrian Boldan [Toronto, Kanado]

el <per-esperanto-humuro@yahoo.com>

Edzino venas hejmen kaj vidas sian edzon kun la muŝ-frapilo en la mano.

- Kion vi faras?

- Mi mortigas muŝojn. Ĝis nun mi jam mortigis du virojn kaj tri virinojn.

- Kiel vi povas scii tion?

- Simple. La du estis sur la bierglaso, kaj la tri - sur la telefono.

*

Preterpasanto, al Kruko:

- Pardonu min, mi serĉas la stacidomon.

- Mi pardonas, bonvolu serĉi.

*

Viro kun du karotoj en siaj oreloj iras surstrate. Alia diras al li:

- Sinjoro, vi havas karotojn en viaj oreloj.

La viro ne aŭdas.

- SINJORO! VI HAVAS KAROTOJN EN VIAJ ORELOJ!

- Hej, kial vi kriaĉas? Ĉu vi ne vidas, ke mi havas karotojn en miaj oreloj?

*

Iu viro ĉiuvespere venas en drinkejon apud sia hejmo, mendas tri glasojn kun vino kaj drinkas tion. Iufoje, babilante kun drinkejmastero, li rakontis, ke havas du fratojn, kiuj loĝas en di-

versaj landoj. Kaj la fratoj interkonsentis, ke ĉiu el ili ĉiuvespere drinkos unu glason por si kaj po unu glaso por ĉiu el aliaj fratoj.

Sed iuvespere la viro venas en la drinkejon kaj mendas nur du glasojn da vino.

La drinkejestro, delikate demandas:

- Pardonu, ĉu viaj fratoj bonfaras?

- Jes, - respondas la viro. - Simple mi decidis ekde hodiaŭ ĉesi drinki.

*

Sekretoj de feliĉa geedziĝo.

1. Estas grave trovi la virinon, kiu povas kuiri kaj purigi.

2. Estas grave trovi la virinon, kiu povas fari la bonan monon.

3. Estas grave trovi la virinon, kiu amoras.

4. Estas grave, ke tiuj tri virinoj neniam renkontiĝu.

kolektis kaj prezentis

Sadretdinova Naila [Voronje, Rusio]

La mastrino en la kuirejo kuiras fiŝan pladon. Apud ŝiaj piedoj manovras kato, per tuta sia vido aludanta je fiŝeto.

- Iru for, - diras la mastrino, - ĉu vi ne vidas, mi kuiras vespermanĝon por la edzo, mi tute ne havas tempon okupiĝi pri vi!

Venas la edzo hejmen, sidiĝas manĝi. La kato karese kaj petante miauas apud li. La edzo prenas fiŝeton kaj ĵetas al la kato. Tiu manĝas kaj subite falas senspire. La edzo rigardas la katon poste

la edzinon kaj ekkrias:

- Ah, vi, malinda virino, ĉu vi volis min venenigi? - kaj la edzo mansvinge batas sian edzinon.

- J-j-j-e-e-s-s-s! - eksaltas la kato, kontenta pro sia venĝo.

*

Veturas motorciklisto kun granda rapideco, subite li ekvidis la paseron, penis bremsi la motorciklon, sed malsukcesis. Li puŝis la birdeton, ĝi perdis konscion kaj falis. La kulpanto prenas la birdeton, venigas ĝin al si hejmen, metas ĝin en la kaĝon, donas por ĝi akvon kaj panerojn kaj nur poste foriras dormi.

Matene la pasero vekigis, ĉirkaŭrigardis kaj diris al si mem:

- Kie mi estas?.. Jen la kaĝo, la akvo, la pano... Terure!, mi mortigis motorcikliston!

*

Se sur la strato vi ekaŭdis krimon: "Idioto!", tute ne nepras sinturni al la voĉo.

*

- Bonvolu rekomendi al mi la plej grandan fakulon en via fako.

- Plezure. Estas Profesoro Dikman, la alteco 192 cm, pesas 200 kg!


*

Klientoj al la taksisto:

- Karulo, veturigu kvar personojn al la stacidomo.

- Kial kvar? Vi ja estas nur tri!

- Kaj ĉu vi mem ne veturos?




Kornjuĥina Anna [Barnaul, Rusio]

Alikin Viktor [Permo, Rusio]

Krucenigmo "Bumerango"


1. Mielo-fara insekto.
2. Oni elpafas ĝin per kanono.
3. Kemia elemento Cz.
4. Frato de la patro aŭ patrino.
5. Strumo.
6. Malpura aŭ difekta loko sur io... (r*)
7. Dolĉa, sukoplena, ruĝa bero.
8. Granda insulo, apartenanta al Grekio.
9. Seĝo de reĝo.
10. Insekto.
11. Atlantiko, Pacifiko. (r*)
12. Larĝa bordo de lago, maro, rivero por sunumantoj.



r* - enskribu nur rudikon, sen finajo "o".

Enigmo "Tri fratoj"

Aleksej, Viktor kaj Sergej loĝas en Moskvo, Irkutsko kaj Novosibirsko. Ili ĉiuj laboras kiel instruistoj kaj instruas diversajn lernobjektojn.



- 1- Aleksej ne laboras en Moskvo.
- 2- Viktor ne laboras en Irkutsko.
- 3- Moskvano ne instruas historion.
- 4- Tiu, kiu laboras en Irkutsko instruas kemion.
- 5- Viktor ne instruas biologion.

Kiujn lernobjektojn instruas la fratoj kaj en kiuj urboj loĝas ĉiu el la triopo?

Solvoj de la taskoj el "Ripozejo" de "K"-3-2004

Krucenigmo "Araneo"

La aranĉojn en "K"-3 plej rapide solvis:

S-ino Jackie Huberdeau, I.E MANS. Francio.

Ŝi tute korekte divenis, ke la ĉifrita proverbo estas:

Espero panon ne donas. Niaj gratuloj! La premio estas sendota.

Respondoj: Estu atenta kaj pensu logike:

1- "Ĉu vi dormas?" 2-Se ne pluvas. 3-Ĝi iĝos 8 jara. 4-Restis tiuj tri, ĉar la ceteraj kandeloj forbrulis tute. 5-Ne, ĉar post 72 h estos ĝuste nokto kaj suna vetero certe ne povas esti. 6-Antaŭ hieraŭ, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, post-morgaŭ. 7-Kiam la pordo estas malfermita. 8-Ambaŭ trajnoj okazos en la sama distanco de Moskvo. 9-Sendepende de la etaĝoj butonon de la 1-a etaĝo. 10-La ŝipo leviĝas kune kun la ŝtupetaro, do, renio ŝanĝiĝos.

Divenu kaj respondu

Ovo 2. Via nomo. 3. Poŝtmarko 4. Rano 5. Serpento

Por ĉiu besto sia nesto



Alumetoj

Du unuaj taskoj estas sufiĉe simplaj.

En la tria oni devas rigardi la egalajon renverse.

Se nia Ripozejo plaĉas al vi, ni petas vin pli aktive solvi la taskojn kaj nepre sendi al ni solvojn de la cnigmoj. La plej aktivan partoprenanton atendas premio!

Pasporta Servo rapidu ĝis la unua de novembro!



Kio estas Pasporta Servo?

Pasporta Servo de TEJO estas unika servo, kiu jam ekzistas dum 25 jaroj. Ĝi servas ne nur al ĝiaj Esperanto-parolantaj gastigantoj kaj gastoj, sed ĝi samtempe facile kaj klare montras al ekstera publiko ke Esperanto utilas kaj funkcias. Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis pri ĝi? Do:

Pasporta Servo estas gastiga reto, kiu nun konsistas el pli ol 1200 gastigantoj en 80 landoj ĉirkaŭ la terglobo. Por aliĝi kiel gasto, sufiĉas aĉeti la *Liston de gastigantoj*. Ekde tiam vi povas uzi la servon. Gastigantoj ne petos monon, multaj eĉ proponos al vi matenmanĝon aŭ bongustan vespermanĝon.

Ekzistas grava kondiĉo — Vi devos lerni Esperanton! — ĉar la aliĝilo estas en Esperanto, la adresaro estas en Esperanto, kaj ĉiuj gastigantoj parolas Esperanton.

Malmultekosta vojaĝado

Per Pasporta Servo eblas malmultekoste vojaĝi. Vi povas senpage tranokti ĉe la gastigantoj. Komence de ĉiu jaro aperas nova listo da gastigantoj. Se vi aĉetas la liston, vi rajtas uzi la servon. Tute simple, ĉu ne? Kaj se vi petveturas, restas nur manĝokostoj dum via vojaĝo. Jen bonega

maniero por ekkoni la mondon per Esperanto.

Agrabla gastigado laŭ viaj propraj kondiĉoj

Se vi mem fariĝas gastiganto, vi ĉiujare *senpage* ricevas la novan liston de gastigantoj, kaj do ankaŭ *senpage* rajtas uzi la servon. Kaj krom tio, vi akceptos interesajn gastojn en via hejmo. Kompreneble, gastigado okazas laŭ viaj propraj kondiĉoj, kiujn vi presigas en la listo. Multaj gastigantoj eĉ ofertas matenmanĝon, dum kelkaj petas modestan rekompencan por tio.

Pasporta Servo estas interesa por ĉiuj aĝoj

Pasporta Servo estas interesa por ĉiu aĝaj homoj. Junuloj gastigas en siaj studentaj ĉambroj, kaj petveture aŭ trajne malkovras la mondon dum la feriaj monatoj. Foje ili gastas ĉe esperantistoj, kiuj estas kvaroble pli aĝaj, sed tio ne malhelpas agrablan babiladon kaj interesan interŝanĝon de spertoj kaj ideoj. Familioj ofte preta gastigi plurajn personojn, kaj mem uzas la servon sammaniere. Malpli junaj homoj havas multan tempon por vojaĝado, kaj preferas la pli komfortajn gastigajn adresojn. Kaj kiam la aĝo iom post iom malfaciligas vojaĝadon, ili daŭre povas akcepti interesajn gastojn en siaj hejmoj.

Praktika libreto

La listo estas kompakta, malpeza, A5-formata libreto, kiun oni facile konsultas dum vojaĝo. La lasta eldono premas 23 mapojn, pli ol 1200 adresojn, enkondukon kaj indekson en 212 paĝojn, kaj pezas nur 147 gramojn. Malgraŭ tio, vi ne bezonas lupeon por legi ĝin. Ĝi aĉeteblas ĉe la libroservo de UEA, kontraŭ EUR 15, kun triona rabato se vi mendas tri aŭ pli.

Aktualaj informoj

Dum la jaro tiu ĉi TTT-ĉeĵmpaĝo de Pasporta Servo informas pri adresŝanĝoj kaj novaj adresoj al posedantoj de la listo.

Kiel fariĝi gastiganto?

Se vi parolas Esperanton, vi povas aliĝi al la servo kiel gastiganto. Tiukaze vi ricevos la liston, kaj vi povos senpage uzi la servon. paspserve@wxs.nl Mencienu *ekzakte* "Pasporta Servo Aliĝilo" en la temlinio! Vi ankaŭ povas rekte plenumi retan aliĝilon.

Limdato (striktaj!) por la venonta eldono estas la

unua de novembro!

Bill Thorne



RIMARO

IRO

barbiro
biro
deziro
emiro
fakiro
kavaliro
liro
miro
piro
turniro
viro
zefiro

IZO

analizo
ĉemizo
devizo
komizo
kotizo
krizo
kvizo
organizo
pizo
rizo
skizo
striptizo
valizo
vizo

ITO

apetito
biskvito
brito
civito
elito
emerito
ermito
inkognito
invito
kredito
kvalito
lito
mierito
milito
mito
orbito
parazito
profito
rito
termito
zenito

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 22 jara komencanto. Interesoj: rokmuziko, matematiko.

Michiel Borkent

Geraniumstraat 48,
7531 ZW Enschede

Nederlando

borkent@cs.utwente.nl

Mi estas 36 jara esperantisto kaj ekonomikisto. Int: Legado, muziko, landaj moroj, historio, ekonomio, orienta filozofio.

Maurice Farley Alencar

Rua Pc. Josii Alves,
423 - Salcianos, 63010-280
Juazeiro do Norte - CE

Brazilo

farleyalencar@yahoo.com.br

Mi estas 67 jara emerita kemia inĝeniero.

Qin Caixue

Beijing,

Ĉinio

qincx418@yahoo.com.cn

Mi estas 34 jara viro. Int: filmoj, libroj, animoj, naturo kaj muziko. Mi ludas futbalon kaj mi grimpas rokojn.

Rob Utley

27 Sycamore Avenue
Leeds LS8 4ZD

Britio

rob_utley25@hotmail.co

Mi estas 20 jara studentino, komencanto. Interesoj: arto, foto, skulptarto, lingvoj, filmoj, subĉielaj agoj, promenadi, boato, vojaĝado.

Daniela Cabello

Bard College
PO Box 5000,
Annandale-on-Hudson
NY 12504

USA

dc855@bard.edu

Gastiganto de Pasporta Servo, int.: medicino, muziko, vivo, vojaĝoj

D-ro Biser Dimitrov

Hadgiev

30 Parvi May Bul., pk 19
BG-9003, Varna,

Bulgario

bisdim@mail.bg

45-jara instruisto, serĉas grupkorespondantojn por siaj lernantoj kiuj aĝas inter 6 kaj 11 jaroj.

Philippe Chavingon

M.F. du Plan,
F-06470

Guillaumes,

Francio

werpha.tao@wanadoo.fr



Lojkina Nadejda [Glazov, Rusio]

KOMENCANTO

2005

restas revuo por vi.

Ne forgesu reaboni!

20 jara fraŭlo el Rusio serĉas divers-ajajn kolektantojn el Francio por longtempa amikeca korespondado kaj interŝanĝo per kolektajoj.

Derjugin Aleksandr

Kavkazskaja, 13-15
Saratov
410049

Rusio

alex-d@mail.com.fr

22-jara studento ĉe la Universitato de Washingtono, progresanto. studas lingvistikon kaj la francan lingvon. Interesoj: teatro, muziko internacia, aliaj kulturoj, lingvoj kaj religioj, legado, moneroj, vojaĝado.

Erik Winsor

Austin House,
Box 44304,
Seattle, WA 98195-0044

USA

winsoet@u.washington.edu

Korespondi tutmonde pri diversaj temoj.

Makarenko Valerij

pk 01243
Tverj
170001

Rusio

komencanto@r66.ru

http://Komencanto.narod.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

